

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №3 Marto, 2010

Kara Leganto! Denove ni kun granda ĝojo salutas vin sur la paĝoj de marta “Saluton!”. Februaro kaj Marto estas du monatoj, firme ligitaj kun la Amo: la 14an de Februaro oni festas ne religian (pli bone – komercan) tagon de Sankta Valentino kaj la 8an de Marto iam Uno deklaris kiel “Internacia Virina Tago” (la lasta estis vaste selebrata en eksa Sovetio). Probable pro tio nia samsocietano Gregoro Dolgin elektis por la prelego la am-temon. Niaj du aliaj membroj – prezidanto kaj vic-prezidanto – pasigis utilan vesperon inter la anoj de Kolegio de Kompleksoj. Pri ĉiuj okazintaĵoj bv legi sube.

—La Redakcio

Amo en Esperanto



A m o (laŭ virtuala Enciklopedio Vikipedio) – profunda emocio pri la ŝatado de alia(j) individuo(j), kun kiu(j) oni sentas sin kunligita, estis temo de nia februara

kunsido. Laŭ la kunteksto la vorto povas komprenigi vastan gamon de signifonuancoj de forta simpatio ĝis amora pasio. Amo estas ofta temo en arto, E-literaturo kaj kino. Amo en morala senco ne estas tiu amo, kiu estas la ĉeftemo de amromanoj. Amo en morala senco ĉefe estas virto; nome la virto de bonvolemo. Ĝi realiĝas per bonfarado kaj evitado de malbonfarado. “Amo ne faras malbonon al proksimulo; amo do estas la plenumado de la leĝo” (Romanoj 13.10). Ĝi povas havi emocian komponanton, sed ne nepre ĝi havas tre altan emocian temperaturon. Tion atendi, tion postuli estas misinterpreto de la biblia teksto. Por normala homo, sub normalaj cirkonstancoj, ne estas eble, emocie ami la tutan homaron. Sed ami ĝin en morala senco, bonvoleme, bonfareme, tio tute eblas. En tiu senco eblas ankaŭ, ami la malamikon. La amo, laŭ la unua epistolo de la Apostolo Paŭlo al la Korintanoj, ĉapitro 13: “1. Se mi parolus la lingvon de homoj kaj anĝeloj, sed ne havas amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo”. S-ro Gregoro Dolgin, kiu estis ĉefpreleganto, deklamis sian originalan E-lirikon kaj ankaŭ elrusaĵojn, duopon de kiuj ni publikigas unufoje en la bulteno dank’al permeso de la tradukisto. Originalojn verkis Ludmila Nekrasovskaja (Dnipropetrovsko, Ukrainio).



Denove strebas mia kor’
Al brilantaj steloj.
Por nokta teo ĝis Aŭror’
Jen dolĉaj karameloj!
Aldonu lakton kun la krem’

En vian tean tason.
Kaj brilon de la diadem’
Por ni Laktvojo lasos.
Denove strebas mia kor’
Al stela dolĉ-frandaĵo.
Al nigra teo ĝis Aŭror’
Distancas unu paŝo.



Lumigu laternon, anim’,
Por trovi eĉ nokte la vojon,
Por senti almenaŭ foje
Liberon kaj ĝojon sen lim’.
Lumigu laternon, esper’,
Por esti al saĝo celanta,
Por iĝi sentime provanta
Dividi mensogon de l’ ver’.
Nigriĝis jam la horizont’,
Kaj se min lanterno ne savos,
Ĝi daŭre lumos kaj gravos
Por sekva pilgrim’ en la Mond’,
Laŭ vojo dezerta al font’.

Ni en Kolegio de Kompleksoj

Sabate, la 27an de Februaro okazis en Ŝikago tre interesa evento. La Kolegio de Kompleksoj (College of Complexes), <http://www.collegeofcomplexes.org/>, la libera parola forumo malferma al la publiko, elektis E-on kiel la temo de la vespero. La Kolegio en la pli-malpli formala, alloga, neenuiga maniero pritraktas multajn diversajn seriozajn temojn. Ili nomas sin “Ludejo de la Pensemujoj”, kaj ili kunvenas por “malkvietigi la mensojn”.

Ĉi-foje La Kolegio invitis por prelegi nian prezidanton. Kiel ĉiumonate, la kolegianoj ariĝis en la konvena Lincoln Restoracio (4008 N. Lincoln Ave). Partoprenis ĉirkaux

50 personoj, kiuj kutime ne havas specialan intereson pri lingvoj. Plejmulto de la partoprenantoj ĝis nun havis neniun, aŭ tre limigitan scion pri la Internacia Lingvo. S-ano Viktor Pajuk en la flua angla lingvo lerte prezentis al ili la historion de Esperanto kaj la resumon de la lingvo mem. Lia brila prezentado elvokis grandan intereson, multajn demandojn kaj viglan diskuton. Multaj diris ke ĉi-kunveno de la Kolegio estis unu el la plej interesaj kiuj laste okazis. Malgraŭ malfruhoro, la ĉeestantoj ne volis hejmen-iri. Favoraj opinioj pri la neceso de la solvo de la monda lingvo problemoj abundis. Pluraj esprimis fortan emon eklerni nian lingvon, dum aliaj volis ekscii pli pri ĝia rolo en la nuntempa internacia vivo. Oni petis deklami la ekzemplojn de poezio (Ho, mia kor!) kaj de ĉiutaga lingvo. Freŝe eldonita de nia E-Societo "La Korvo" de E.A. Poe tuj fariĝis taŭga ekzemplo por montri al la anglalingva aŭskultantaro.

La evento klare montris kiel grava estas la rolo de la ekstera agado por la dissemado de la informo pri Esperanto, por klarigado de la miskonceptoj, kaj por ĝenerala eduko de la socio. La elekto de la ĝusta forumo de la vastmensaj usonaj kleruloj evidentiĝis tre efika. La E-Societo ŝuldas multajn dankojn al la prezidanto Pajuk pro tre valora iniciato kaj pro tiel sukcesa plenumo de la nefacila tasko.

Gratulon, nia Prezidanto! Bravo!!!

—Leszek Kordylewski, Vic-Prezidanto

P.S. D-ro Kordylewski, 50-jara E-isto, modeste ne menciis lian brilan, emocian 20-minutan elpaŝon en mia (pli ĝuste – en E-o) subteno. Sinceran dankon al li!

—V. Pajuk

Atentigi Vatikanon!

Kiel estas konate antaŭ 18 jaroj papo Johano Paŭlo II enkondukis E-on por siaj tradiciaj mesaĝoj al "La Urbo kaj La Mondo" okaze de Kristnasko kaj Pasko. Pastro Duilio Magnani proponas ĉeesti virtuale en Placo de Sankta Petro la 4-an de Aprilo 2010, kiam papo Benedikto XVI same rediros mondvizie "Urbi el Orbi" tagmeze de Pasko-festo, la samajn salut-bondezirojn: "Feliĉan paskon en Kristo resurektinta" kaj poste skribi simplan paperan dank- kaj gratul-bildkarton aŭ letereton al Lia Sankteco Benedikto la Deksesa (sufiĉas: 00120 CITTA DEL VATICANO) pro la 18-a datreveno de la paskaj salut-bondeziroj. Tia kaj tiu estas por ni atentigi Vatikanon pri Esperanto.



Kongreso de Esperanto-USA

La 58-a Tutnacia Kongreso okazos la 28-31an de Majo 2010 en la urbo de Vaŝingtono en Hyatt Regency Hotel, Bethesda, Merilando. "Lando de libero, lando de la estonteco, mi salutas vin!". Per tiuj vortoj la kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof komencis sian paroladon dum la 6-a UK okazinta en Vaŝingtono en 1910. Partoprenu ĉi-jarajn solenaĵojn okaze de la 100-jara datreveno de la evento, denove – en Vaŝingtono. Ni ĝuos la Memortagan festadon en la ĉefurbo kaj la E-etoson dum la kongreso.



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Marto – Andreo Kolganov kun temo "Skrib-sistemoj por la uzbeka lingvo: spertoj de la XX-a jarcento"

... 27an de Junio – Tradicia Pikniko